Richard von Schaukal,

Sub vintraj steloj

tradukita de Manfred Retzlaff

La nokt' silentas sub la rond' ĉiela,
Multoble brilas stela lum-radi'.
El iu foro venas spir' alŝvela,
Resinkas en tegitan grundon ĝi.

Rigardas mi l' trembrilon en trankvilo,[2]
La nigra volb' etendas larĝe sin!
Ne sentas mi min en la fremda brilo,
La senfineco superfortas min.

Traduko de la Germana poemo "Unter Wintersternen" de Richard von Schaukal *(∗1874-05-27 – †1942-10-10) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-637-1283 (2013-07-27 19:19:27)

Tiu ĉi poemo aperis en 1989-01-29 en la germana eklezia gazeto "Bistumszeitung Münster", sur pago 2.

[2] aŭ:
Rigardas mi la stelojn en trankvilo,